SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://satesperanto.free.fr *** retadreso: satesperanto@free.fr





Foto: Gattin Nenad+

Januaro 2005 76-a jaro, n-ro 1 (1195)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj,
ni eniris en la novan jaron 2005 esperante ke ĝi estos pli bona, pli paca kaj pli kuraĝiga ol la antaŭa. La saman esperon ni havas pri la evoluo de nia kara asocio. Ĝia prospero ĉefe dependas de vi ĉiuj. Do, post la festoj kaj senlaboraj tagoj, ek al la agado.
Bonvolu tuj aliĝi al la kongreso ĉar la plej favora periodo finiĝas fine de januaro. Nun vi nur aliĝu kaj poste vi mendos la loĝadon, manĝojn kaj ekskursojn. Ni faru ĉion por ke nia kongreso estu kiel eble plej sukcesa.
Krome kion diri alian: varbu, varbu, varbu!!! - ĉar por efike aktivi ni bezonas niajn membrojn.
Kamaradece al ĉiuj,

via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSRFRPPPAR
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.



Imprimé par : EDRB, 7 rue Marie Pia, FR-91480 Quincy-sous-Senart.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

Irassyaimase !

(japane : bonvenon!)
aŭ Tinĉjo en Japanio.

Post invito de la SAT-membroj el Japanio, mi vizitis inter la 11-a de oktobro kaj la 2-a de novembro la landon de la supreniranta suno. Miaj spertoj kaj impresoj povas interesi ankaŭ aliajn homojn, tial mi verkis ĉi tiun vojaĝraporton.
Tinĉjo estas figuro el belga bildrakonto kiu, kiel ĵurnalisto, serĉis la veron.

Pri Marjorie Boulton mi pensis kiam mi staris en la terminalo de la Brusela flughaveno, la 11-an de oktobro 2004. Estis iom post la 8-a matene kaj mi atendis la aviadilon kiu transportos min al Vieno kaj de Vieno al Kansai-Internacia Flughaveno en Oosaka kie, se la dioj kaj diabloj bonhumoras atendos min Tahira Masako.

Dum la tempo kiam mi estis prezidanto de "La Verda Stelo", la loka Eo-klubo en Antverpeno, prelegis iam Marjorie Boulton. Mi bone memoras ke ni babilis dum vespermanĝo pri nia timo vojaĝi, precipe kiam temis pri vojaĝoj ekster propra vilaĝo. Vojaĝi aviadile, trajne, aŭtobuse kaj … nu ja, simple esti for de la propra nesto, Marjorie kaj mi estas kvazaŭ ĝemeloj kiam temas forlasi la propran hejmon. La ŝvitado, la nervozeco, la seka buŝo, pri ĉiuj tiuj aferoj mi parolis kun Marjorie kaj pro tio mi pensis pri ŝi.



Masakato en trajno direkte al Kyoto

Ekzakte laŭ antaŭvidita tempo la granda birdo flugis kun mi en la stomako al Vieno. Nenio grava okazis kaj la aviadilo taksiis sen iu damaĝo ĉe terminalo de la Aŭstria flughaveno. Rapide mi sendis mallongan mesaĝon al mia edzino ke mi daŭre vivas kaj bonfartas.

Promenado tra la flughaveno de iom pli ol 15 minutoj direktis min al la lokalo kie jam sidis, atendante la aviadilon por Oosaka, dekoj da japanoj. Ĉiuj bonhumoraj kaj gajaj, imagu. 11horojn kaj 40 minutojn bezonas la aviadilo por flugi kun ĉi tiuj afablaj homoj kaj mi al Japanio. Kredu aŭ ne, sed ankaŭ ĉi tiu flugo estis sukcesa. Mankis en la aviadilo spaco por la kruroj, pro la fakto ke iu germano nepre volis meti la seĝon tiel ke li komforte povis dormi. Ke pro tio restas por mi neniu loko por miaj kruroj, lasis lin tute indiferenta. Mi ne sciis ĉu ĉi tiu ago de la germana samklasano estis la lasta ĝeno kiun mi

daŭrigo paĝo 12

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

Dek motivoj por rifuzi la projekton de traktato pri Eŭropa Konstitucio

(Originala titolo de la artikolo:
"Dix sujets qui fâchent" = Dek temoj, kiuj kolerigas)
El eksterseria numero de "L'Humanité" (Oktobro 2004),
artikolo de Thomas Lemahieu tradukita de Petro Levi.

l'Humanité

1. Libera cirkulado de la kapitaloj.

Ekstreme malutila, tiu regulo estas tiel esenca en la "konstitucia" traktato, ke krom en la partoj I kaj III ghi ĉeestas eĉ en la antaŭparolo de la "ĉarto de la fundamentaj rajtoj de la Unuiĝo". Tiu fantomo de la "libera cirkulado de la kapitaloj" obsedas tra la tuta projekto de konstitucia traktato kaj surbaze de tiu konstato oni povas paroli pri "konstituciigo" de la liberalismo en Eŭropo! Sub la premo de tiu absoluta postulo, kion do valoras la deklaroj de intencoj, apenaŭ aluditaj sed neniam devigaj, kiel tiu "sociala merkatekonomio altnivele konkurkapabla, kiu tendencas al la plena okupo kaj al la socia progreso" (I-3-3)? Eĉ la eŭropa Parlamento - alivorte, la deputitoj elektitaj de la popoloj - ricevas la ordonon "realigi kiel eble plej vaste" tiun liberan cirkuladon de la kapitaloj (III-157-2) kaj tial havas la devon partopreni en la vetkuro pri la translokigoj de entreprenoj, en la rekta instigo serĉadi la plej "allogajn" zonojn por la kapitaloj, tiujn, kie oni povas malsupren tiri la salajrojn kaj la rajtojn. Plej malbone: por malebligi ĉian estontan ekonomian alternativon, la "konstitucia" traktato iras ankoraŭ pli malproksimen, pretendante tutsimple "malpermesi" la "limigojn al kapitalmovoj" (III-156); tio konkrete signifas anticipe malebligi ĉian efektivigon de ia ajn imposto (el la tipo de Tobin'a takso) pri la financaj transakcioj aŭ de rimedoj celantaj lukti kontraŭ la industriaj translokigoj sen uzo de la perversaj armiloj de la fiska kaj socia dumpingo. Fine, por starigi rimedojn, kiuj konsistigus, laŭ la "konstitucia" traktato, "regreson en la juro de la Unuiĝo" favora al la "liberaligo de la kapitalmovoj", la Konsilio de la 25-landa Eŭropo devus unuanime decidi. Dank'al tio, sufiĉa estos la kontraŭstaro de unu lando por ebligi al la libere moviĝantaj kapitaloj, ke ili daŭrigu transformi Eŭropon en ĝangalon.

2. Konkurenco "libera kaj ne falsita".

Iomete ŝminkita en la parto I (kun, ekzemple, laŭdindaj sed nur sorĉkantaj alvokoj al "socia" merkatekonomio, al "libera kaj justa komerco" aŭ ankoraŭ al "daŭra disvolviĝo"), sed senigita je tiu falsa diskretemo en la parto III, la temo pri "merkatekonomio", "malfermita", "altnivele konkurkapabla", kie la "konkurenco estas libera kaj ne falsita" saturas la tutan projekton de Konstitucio. En tiuj kondiĉoj, se tiu traktato estus alprenota, la eŭropa Unuiĝo realigus la antikvan utopion de la plej radikalaj liberalistoj: meti la kapitalismon plejparte ekster la povon de la leĝofaranto kaj forpreni la ekonomion for de la politika respondeco. Laŭlonge de la traktato, kiam ili ne tute simple malpermesas ĝin, dekoj da aranĝoj draste subordigas la politikan "reguladon" al la postuloj de la libera interŝanĝo kaj de la malfermiteco de la merkatoj. Ekzemple, kiam temas pri "socia politiko", "la Unuiĝo kaj la membroŝtatoj agas kun konsidero pri la neceso konservi la konkurkapablon de la ekonomio de la Unuiĝo" (III-209), aŭ, pri la entreprenoj, nepre necesas eviti administraciajn, financajn kaj jurajn trudojn, kiuj povus ĝeni la kreon de malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj" (III-210-2-b). Kaj, malofte, kiam la traktato kuraĝigas la politikan "intervenon" de la ŝtatoj, tion ĝi faras por enprofundiĝi en la liberaligon: "La membroŝtatoj penas por efektivigi la liberaligon de la servoj trans la nivelon de la devigo, se la ĝenerala ekonomio kaj la situacio de la koncerna sektoro tion ebligas" (III-148).

3. La publikaj servoj kiel pafcelo.

Naĝanta en la bano de "libera kaj ne falsita konkurenco", la "konstitucia" traktato estas en regreso pri la publikaj servoj, rilate al la traktato de Nico. Ĝi enkorpigas nek en la "valoroj" (I-2) nek en la "celoj" (I-3) de eŭropa Unuiĝo la principon de "publika servo". Ĝi konceptas tion, kion ĝi nomas "servoj de ĝenerala ekonomia intereso", kiel esceptojn tolereblajn, sed sub rigoraj kondiĉoj. Atentu tiuj, kiuj "trouzus" publikajn servojn! Ili estas "submetitaj al la reguloj de la konkurenco" (III-166-2) kaj "krom ne en okazo de escepto", la "helpoj konsentitaj de la membroŝtatoj aŭ pere de ŝtatrimedoj sub kiu ajn formo falsanta aŭ minacanta falsi la konkurencon" estas "nekongruaj kun la interna merkato" (III-167-1) kaj do malpermesataj. Ni notu, plie, ke la eŭropa direktivo pri la servoj de ĝenerala ekonomia intereso, kiu principe difinas la "eŭropan leĝon", al kiu la "konstitucia" traktato resendas, ŝajnas pli ol iam ajn implikata de la Komisiono. Dum tio la direktivo pri la liberaligo de la servoj (t.n. "de Bolkestein") estas impulsegata kontraŭ la eŭropa socia modelo kaj rangas antaŭ ĉia stabila difino de la nocio de "publika servo" (aŭ de "servo de ĝenerala ekonomia intereso") ĉe la nivelo de la Unuiĝo: krom la servoj jam traktitaj de alia direktivo - kaj tial jam disponitaj al la merkato - (transportoj, financaj servoj kaj telekomunikoj) kaj krom tiuj, kiujn jam senpage kaj rekte liveras publikaj instancoj - admiru tiun striktegan koncepton pri publika servo -, ĉiuj servoj submetiĝos al la direktivo "de Bolkestein", inkluzive la edukadon, la kulturon kaj eĉ la sanon.

4. La mona sistemo kiel ŝlosilŝtono.

Lastmomente, pro insista peto de la eŭropa centra Banko (ECB), la eŭropa Konsilio aldonis "la stabilecon de

la prezoj" en la unua rango de la "gvidprincipoj" de la Unuiĝo (I-3-3). Ni estas tie en la koro de la liberala Eŭropo, kaj ankaŭ bedaŭrinde en la centro de tiu "konstitucia" traktato: ECB, la institucio, kiu havas la ĉefan decidpovon pri la uzo de la rimedoj de Eŭropo, havas kiel mision, ne progresigi la dungadon aŭ la formadon (tiuj vortoj eĉ ne figuras en ĝia statuto), sed fari la zonon de euro "alloga" por la investistoj. Tiuokaze la "stabileco de la prezoj" signifas la redukton de la publikaj kaj sociaj elspezoj, la "salajran moderigon", la liberalajn kontraŭreformojn de la emeritaj pensioj kaj de la socia Sekureco... La "sendependeco" de ECB kaj do ĝia protekto kontraŭ ĉia demokrata kontrolo, estas garantiita (III-188): ECB, kiu tute senpune povas preni siajn instrukciojn en la afermedioj, la ultraliberalaj rondoj aŭ la financaj premgrupoj, havas la unuflankan povon trudi sian politikon al la ŝtatoj, devigi ilin redukti la impostojn aŭ malkonstrui la reĝimojn de socia protekto, ĉar ĝi disponas la supermezuran povon, tute sola agi pri la interezokvotoj. Neniu instanco povas sankcii ĝin, neniu plimulto, demokrate elektita, povas ĝin kontroli. La "pakto de stabileco", kvankam nun en krizo kaj kiu en tiuj lastaj jaroj blokas ĉiujn grandajn sociajn mobilizojn, estas firmigita: la agado de la membroŝtatoj kaj de la Unuiĝo "nepre respektas la sekvantajn gvidprincipojn: stabilaj prezoj, sanaj (rigoraj) publikaj financoj kaj financaj kondiĉoj, kaj stabila ekvilibro de la pagoj".(III-177)

5. La atlantista identeco.

Ne pro hazardo, en la unuaj artikoloj de la Konstitucio, la paco ne estas klasita nek konsiderata kiel fundamenta "valoro" de eŭropa Unuiĝo. Ĝi restas simpla potenciala celo inter aliaj. Plie, ĝi estas ekskluzive kaj tuj rezervita al la popoloj de la Unuiĝo: estas sur tiu kampo nenia universala dediĉo, kiu estus malsamega je la usona unuflankismo: "En siaj rilatoj kun la cetera mondo, la Unuiĝo asertas kaj akcelas siajn valorojn kaj interesojn" (I-3-4). Oni estas for de alia Eŭropo por alia mondo, en kiu la paco iĝus angula ŝtono en la tutmonda ordo ... Plej malbone, kiel pri ekonomiaj kaj financaj temoj, la "konstitucia" traktato specifas, ekde sia unua parto dediĉita al la identeco de Eŭropo, ke la politiko de la Unuiĝo, orientata al la kresko de la militaj elspezoj (I-41-3), unu el la maloftaj kampoj, kie, ĉar temas pri "reĝeca" funkcio, la eŭropaj institucioj instigas al publika elspezemo -, devas esti "kongrua" kun tiu de la Organizo de la traktato de Norda Atlanto (NATO). NATO estas konsistigaĵo de la eŭropa identeco: oni pensas, ke oni sonĝas!

6. Civitana povo katenita.

Laŭ la defendantoj de la "jes" al tiu konstitucia traktato, la demokrataj "progresoj" en tiu teksto devus fari ĝin akceptebla. Fakte, la nova institucia arĥitekturo ne fundamente ŝanĝas la aferon: la kampo de "kundecido" inter la eŭropa Parlamento kaj la Konsilio de la Ministroj plivastiĝas, sed tre ofte, en praktiko, pro la institucia meĥaniko de "kundecido", la pozicioj de la Konsilio, kaj ne tiuj de la Parlamento, fariĝas ne amendeblaj. Cetere, la Parlamento ĉiam povos rifuzi la prezidenton de la Komisiono prezentitan de la Konsilio; en praktiko ĝi nur rajtas ratifi la proponon (I-27-1).

Pro tiuj du instituciaj novaĵoj la defendantoj de tiu traktato ĝojkriegas. Sed la reala povo de la Parlamento restas tre limita: ĝi ankoraŭ ne povas prezenti siajn tekstojn nek leĝofari, ĉar la Komisiono konservas la monopolon de la leĝofara iniciato (I-26-2); ĝi restas ekskluzivita de la decidoj pri la enspezoj de la Unuiĝo kaj pri la plej granda parto de la asigno de la elspezoj de la eŭropa Unuiĝo. En la stato de la nuna projekto, la iniciatpovo de la eŭropa Parlamento restas limigita al la rolo de "kontrolo de konformeco" de la eŭropaj leĝofaraj iniciatoj, sen reala povo pri "kontrolo de enhavo". Prezentita sen rido kiel progreso de la "partoprena demokratio" la ebleco de petskribo de unu miliono da civitanoj multege similas skuludilon. Kun sia amasigo da nedevigaj antaŭgardoj, la artikolo de la konstitucio tamen estas perfekte klara (I-47): la Komisiono "povas" esti "invitata submeti adaptitan proponon cele al la apliko de la konstitucio". Tiel oni aldonas riglilojn al la seruroj.

7. Litanio de piaj deziresprimoj.

Hontemaj defendantoj de la eŭropa konstitucio foje provas pravigi sian konsenton per la enŝovo kiel parto II de la "ĉarto de la fundamentaj rajtoj". Krom tio, ke tiu ĉarto enhavas tre diskutindajn artikolojn - la "libereco labori" anstataŭ la "rajto ricevi laboron" (II-15-2), la "rajto atingi senpagan servon de dungigo" kaj ne la "rajto je anstataŭa enspezo" en okazo de senlaboreco (II-89), la "rajto je helpo por loĝejo" anstataŭ la "rajto je loĝejo" (II-94-3), ktp. -, ni substreku, ke ĝi ĝenos la trankvilan dormon de neniu liberalulo, ĉar en sia kampo de apliko, ĝi mem specifas la submeton de la "fundamentaj rajtoj" al la aliaj principoj, kiujn la konstitucio enhavas, en kiuj unuarange oni ankoraŭ kaj ankoraŭ trovas la sanktan "merkaton, en kiu la konkurenco estas libera kaj ne falsita". Tiuj rezervoj, kiuj korektas la ĉarton en ĝia konkludo, subordigas kontraŭ ĉia konstitucia tradicio la fundamentajn rajtojn al la logiko de la kondukataj politikoj (II-111 kaj II-112). Per tiu radikala renverso, la vortigitaj rajtoj riskas esti reduktataj al la rango de piaj deziresprimoj: "Ĉi tiu ĉarto kreas neniun kompetentecon nek iun novan taskon por la Unuiĝo" (II-111-2).

Konsekvence laŭ la mastriĥta traktato, la konstitucio kreas eŭropan Unuiĝon funkciantan surbaze de diskriminacio pri civitaneco (I-10-1): al la landanoj, ne devenantaj de la membroŝtatoj kaj ne agnoskataj kiel civitanoj, la eŭropa spaco rezervas zonon de tre vaste kripligitaj rajtoj. Per tiu konstitucia traktato, la eŭropa Unuiĝo fosiliigas tutan politikon pri migrado. Kaj la "valoroj" - ankaŭ ĉi tie - rapide malaperas favore al la "interesoj" de la Unuiĝo: for la landanan civitanecon! Fosiliigita en la jam suferitaj devojiĝoj, la

rifuĝrajto siaflanke restas ekstreme redukte difinita. Laŭdata en la antaŭparolo pro siaj kontribuoj al la eŭropa civilizacio, la migrado plu estas konsiderata, en la korpo de la teksto, nur el la vidpunkto de la liberala utilismo: laŭbezone kribrebla laborforto.

9. Varigita kulturo.

Ne pro hazardo, la "kultura escepto" estas lastmomente enkondukita en la eŭropan konstitucion, sed sub alia nomo, kiu malplivalorigas ĝin: "kultura diverseco" (III-280-4). Ĉar la kulturo ne estas varo kiel la aliaj, ĝi devus ricevi apartan traktadon, sed ankaŭ tie, tio okazas nur sub kondiĉoj: "La helpoj celantaj favori la kulturon kaj la konservadon de la kultura heredaĵo, kiam ili ne aliigas la kondiĉojn de la interŝanĝoj kaj de la konkurenco en la Unuiĝo" povas eventuale "esti konsiderataj kiel kongruaj kun la interna merkato" (III-167-3-d).

10. Trudkitelo.

Jen estas do traktato, kiun oni devas aŭ bloke akcepti, aŭ lasi en pecoj. Kaj oni volus kredigi al ni, ke ĝi estas fleksebla? Sed ĝuste tial, ke ĝi ne estas konstitucio aŭ ne sufiĉe aspektas kiel konstitucio, tiu teksto pretendas gravuri en la marmoro normojn, valorojn kaj celojn, kiujn ĝi specifas... En sia parto IV, dediĉata al la "ĝeneralaj kaj finaj dispozicioj", tiu traktato, konkludita "por senlima daŭro", faras pli ol neprobabla en praktiko ĉian eblecon de revizio de ĝia enhavo (IV-443). Ekzemple, por transformi la multegajn artikolojn dediĉitajn al la unuarangeco de la konkurenco kaj de la merkato super la publikaj servoj, la specifita proceduro konsistigas multobstaklan kurejon, kies finon oni riskas ne vidi: ĉar la regulo de la unuanimeco de la membroŝtatoj aplikiĝas, sufiĉos, post alpreno de tiu projekto de konstitucio, la vetoo de unu ununura registaro por rifuzigi ĉian reviziigon de la teksto.

ATENTIGO AL NIAJ MEMBROJ KAJ LEGANTOJ !

En tiu ĉi numero jam la duan fojon vi trovas kotiztabelon por la jaro 2005. Ni petas vin pagi vian kotizon en la komenco de la jaro por eviti postan forgeson, ĉar la kotizoj estas tre gravaj por la bona funkciado de la Asocio. Pro la fakto ke la nombro de niaj membroj ne estas granda, ni havas sufiĉe gravajn financajn problemojn. Por iom helpi ni petas **ĉiujn kiuj povas (do eĉ pensiuloj, junuloj ktp, kiuj povas)** ***pagi plenan kotizon kaj ne la duonan***. Se vi deziras helpi al la malriĉaj membroj aŭ al la membroj en nepagipovaj (malriĉaj) landoj, bonvolu **donaci minimume 15 €**. Alia maniero por helpi al la Asocio estas **aĉeto de SAT-libroj** (por donaci al aliaj, se vi jam havas ilin), kaj la **varbado de novaj membroj**. Ĉiu el ni havas esperantistajn konatojn kiuj ne estas membroj de SAT. Do se ĉiu el ni venigos al SAT unu novan membron, tio duobligos la nombron de niaj membroj kaj SAT povos pli facile funkcii kaj agadi. Dankon.

La SAT-oficejo

La movado **havis** SEMAJNOn
... ĝi kostis 208 eŭrojn
... ĝi aperis unu semajnon

La movado **havas** MONATOn
... ĝi kostas nur 44 eŭrojn*
... ĝi aperadas jam 25 jarojn

La movado **havos** MONATOn
... dum la movado abonas ĝin
... MONATO bezonas pli da movado

VI ESTAS LA MOVADO
... Vi bezonas MONATOn
... MONATO bezonas Vin

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, moderna vivo, scienco, kulturo kaj multe pli.

Petu provnumeron de MONATO,
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio,
aŭ prefere de monato@fel.esperanto.be

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

*En difinitaj landoj la prezo povas esti alia. Petu informojn de monato@fel.esperanto.be

Ĉu kredi aŭ ne kredi ? tiel staras la demando

En pli fruaj jarcentoj kiam la plimulto da homoj estis analfabetaj, la popolo lernis sian religion per bildoj. Giotto ekz. pentris kvazaŭ "bildstrion" pri la vivo de Kristo.

Por anstataŭigi paganismon, la eklezio establis kredartikolojn, ĉefe kun la ideo (de la judoj) pri unuopa Dio, kiu kreis la homaron. En la 13-a jarcento malkredo estis neebla; la mezepoka menso estis fermita, entute ĉirkaŭita per religiaj bildoj kaj simboloj.

Sed kiam homoj komencis vojaĝi tra la mondo, ili malkovris, ke aliaj homoj ne kredas la samon. En la 17-a jarcento misiistoj en Ĉinio ekkonsciis pri civilizacio kiu taŭgas por 300 milionoj da homoj, kiuj neniam aŭdis pri Kristanismo. Skeptikuloj ankaŭ malkovris la antaŭ-kristanajn ideojn de Epikuro, Lukrecio kaj Demokrito. Tiuj sugestis, ke eble ne estas senmorta animo.

Dum la venontaj jarcentoj pensuloj ellaboris modernan, memfidan ateismon. Scienco ŝajnas nei religian kredon. Kristanismo heredis la Ptolomean teorion, ke la Tero estas je la centro de la universo, la laboro de ĉiopova dio. Sed Koperniko kaj Galilejo pruvis, ke la tero estas nur eta parto de la universo kaj kun aliaj planedoj rotacias ĉirkaŭ la suno, kaj la suno estas nur unu el milionoj da steloj.

"Estas en ĉiu vilaĝo torĉo - la lernejestro;
kaj estingilo - la pastro."
(Victor Hugo)

Lutero, Kalvino, k.a. disŝiris dogmon; estis multaj skismoj, ne plu unuopa katolika eklezio. Oni konsideris Anabaptistojn kiel ateistojn. Ankaŭ Unitarianojn, kiuj kredas, ke Kristo estas nur viro, kaj ne okazis aŭ releviĝo aŭ ascensio. En 1579, oni ŝtiparumis la estron de la Unitarianoj. En la 16-a, 17-a kaj 18-a jarcentoj la aŭtoritatoj faris multajn leĝojn kontraŭ ateismo.

En la 18-a jarcento Deistoj aperis. Ili kredis pri Dio sed malkontentiĝis pri la stato de Kristanismo. Komenciĝis Humanisma Kristanismo, kiu emfazis racionalismon, sen emfazo je mirakloj. La unua malkaŝema ateisto estis Hobbes en la mezo de la 17-a jarcento. Li sistemigis ateismon en Leviathon. La ideo de senmateria animo estas memkontraŭdira kaj sensignifa. Sekvis multaj parlamentaj leĝprojektoj por kontraŭi malkredon.

"Civilizacio ne atingos perfektiĝon ĝis la lasta ŝtono de la lasta preĝejo falos sur la lastan past ron." (Emile Zola)

Post Neŭtono (Koperniko kaj Galilejo) ne eblas, ke inteligenta homo povu kredi, ke la tero estas la centro de la universo, sed iuj biologoj kredis, ke iliaj trovaĵoj estas indico de "inteligenta intenco".

Tiu teorio asertis, ke ĉio - de la beleco de papilio ĝis la mirindaĵo de vidkapablo - pruvas ke ekzistas kreinto, perfekte bona kaj ĉiopova, kaj kompense homoj devas ami kaj adori tiun kreinton. Oni ofte postulatas: *'Mi trovas horloĝon; iu devis fari ĝin; ĉiu manifestaĵo de desegnaĵo en la horloĝo ankaŭ ekzistas en naturo'*.

Sed ni scias, ke iu faras la horloĝon ĉar ĝi ne nature ekzistas kaj tial ĝi devas havi kreinton. Tamen, ni neniam povas certiĝi pri kreinto de la natura universo. Se dio kreis ĉion, ne troviĝas io ajn ne farita - por kompari kun ĝi. Plue la tekniko por la "kreaĵo" estas nekonata kaj la "kreinto" ne povas repliki ĝin.

"Kiom mi memoras, ne troviĝas eĉ unu vorto en la Evangelioj kiu laŭdas inteligentecon."
(Bertrand Russell)

Je la fino de la 18-a jarcento ateismo estis grava demando. Francaj filozofoj kredis, ke nescio kaj timo kreis la diojn kaj kredemo konservis ilin. Baron D'Holbach estis la unua homo kiu asertis, ke ne troviĝas ia ajn dio. La publika ekzekutisto bruligis liajn librojn.

"El ĉiuj tiranecoj kiuj afliktas la homaron, religio estas la plej malbona .... Ĉiuj eklezioj, juda, kristana aŭ islama estas homaj inventaĵoj fonditaj por teruri la homaron kaj por monopoligi potencon kaj profiton." (Thomas Paine)

Paine konstante atakis ortodoksajn kredojn kaj instigis homojn propravole formi siajn racionalismon kaj moralajn sentemojn. Oni diras, ke sen la eklezio, homoj fariĝus malvirtaj, kaj reirus al besta naturo, sed Paine respondis:

"Estas el la Biblio, ke homoj lernis kruelecon, seksatencon kaj murdon. La kredo pri kruela Dio faras kruelan homon. La Biblio brutigis kaj koruptis la homaron."

"Religio estas bonega blago por silentigi la popolamason."
(Napoleon Bonaparte)

"Se li estas senfine bona kial ni devas timi lin? Se li estas senfine saĝa kial ni devas havi dubon pri nia estonteco? Se li scias ĉion kial averti lin pri niaj bezonoj kaj lacigi lin per niaj preĝoj? Se li estas ĉie kial konstrui templojn por li?"
(Percy Bysshe Shelley)

Jeremy Bentham starigis sekularan alternativon kiu garantius moralan stabilecon sen religio. Lia respondo estis utilismo (la plej granda boneco de la plej granda nombro).

"Ĉiuj pensantaj homoj estas ateistoj."
(Ernest Hemingway)

La juda kaj kristana kredoj estis bazitaj je la ideo (laŭ Genezo), ke la Dio kreis la mondon dum ses tagoj. James Usher en la jaro 1600 anoncis ke la mondo estis kreita en 4004 a.K. Geologoj plue embarasis religiulojn per sia pruvo, ke la mondo ekzistas dum milionoj da jaroj. Kaj Darwin (Origino de Specioj) bazis sian teorion pri evoluado sur tiu fakto. Tiel Darwin esprimis dubon pri la

rolo de la Dio kiel kreinto de naturo.

La ideoj de Darwin estis ruinigaj kaj danĝeraj. Lia ideo pri natura selektado subfosis la ideon de la Dio. Tio konsternis la eklezion ĉar ĝi neis inaŭguran kreadon, en kiu la Dio tuj kreis ĉiujn naturajn speciojn. Por nesciaj kaj stultaj fundamentistoj Darwin estas blasfemo.

Sekularismo estis treege populara en la 19-a jarcento. Oni fondis la Nacian Sekularan Societon, kaj ĝi ankoraŭ ekzistas. La fondinto Bradlaugh akiris la rajton "aserti" anstataŭ "ĵuri". Sed kial kredo travivis?

Freud pretendis kompreni la originon de ĉiuj religioj. Li montris, ke kredo estas fundamenta al frua homa evoluado. Homoj devis respondi al superpotenco pro infaneca senhelpemo kaj rilato al patro-figuro. Li konsideris, ke religio estas iluzio; estis "plenum-deziro". Religio estas falsa kaj profunde nehelpema.

"Religio estas la signo de la opresita estaĵo, la viktimo de senkora mondo, la opio de la popolo."
(Karl Marx)

Paradokse la unua ateista ŝtato por konstrukcii novan oran epokon por la homaro, torturis, enkarcerigis kaj ekstermis pli da homoj ol Kristanismo kiam ĉi lasta estis plej ekscesa. La rusa revolucio nejuste makuligis ateismon. Tamen la katastrofoj de la 20-a jarcento subfosis kredon pri bonfara dio.

Ateismo kaj kontraŭateismo

Malsimile al ateisto kiu nur ne kredas pri dio, kontraŭ-teisto kredas, ke religio estas danĝera kaj malutila, kaj aktive kontraŭas ĝin. Estas tre malfacile imagi mondon sen religio. Tiu penetras socian vivon dum jarcentoj. Eĉ por tiuj, kiuj ne havas religion estas malfacile nekonscii pri ĝi. La plej malbonaj aspektoj de religio estas la kristanaj fundamentistoj kaj la islamaj sinmortigemaj ekstremistoj.

Al iuj homoj ŝajnas, ke nekredantoj ne havas gravecon; ke ili ne povas rekoni la ekzistadon de la animo kaj ĝia senmorteco. Sed la nekredanto diras, ke oni ne devus ĝeni pri neekzistado post morto. Ne estas alia vivo.

Estas longa historio de abomenaĵoj faritaj en la nomo de religio; ankaŭ longa historio de heroa kontraŭstaro al religio. Religio estas ankoraŭ danĝera: minacoj al la ne-islama okcidento; la nehelpema rilato inter fundamentistoj en la "Blanka Domo" kaj la israela establo.

Ateismo ne estas kredsistemo sed intelekta libereco. Kiam oni rigardas la fascinadon kaj variadon de plantoj kaj bestoj, nub-aranĝojn, la universon, ne necesas inkludi kredsistemon ĉar la mondo estas sufiĉe interesa. Ateismo estas simpla fakto, manko de deteno.

Kiam oni pruvas al religiuloj, ke iliaj kredoj ne eltenas al ĉiuj argumentoj, atesto kaj analizema ekzameno, ili respondas, ke ili scias, ke la Dio ekzistas. Multaj filozofoj atentigis pri la evidenteco, ke individua certeco ne garantias veraĵon. Kaj la fakto, ke multaj homoj ŝajnas senti la bezonon por Dio ne pruvas ĝian ekzistadon. Religiaj konvinkoj estas ofte ekstreme potencaj. Multaj mortigis kaj mortis por ili.

Ŝajnas, ke interesuloj pri politiko ofte neglektas religion, sed la du aferoj estas nemalimplikeblaj. Historie kaj nuntempe, religio malprogresigis la bonfarton de la laboristo. Socia produktado devas akordi kun socia posedeco. Sed religio ne havas racian bazon kaj montras senfinan kapablon de la homa menso kredi nekredindajn fantaziojn.

Religio kaj naciismo estas la ĉefaj malamikoj de la homaro kaj ambaŭ naskiĝas de la pernicioza ideologio de privata ter-posedeco kaj kapitalismo. Tiuj garantias la koncentriĝon de riĉeco en la manoj de privilegiita minoritato.

Malriĉeco kaj religio estas litkunuloj. Neeblas imagi kapitalismon sen milito. Simile oni ne povas imagi kapitalismon sen religio. Ili estas esenca parto de la sama degenera socio.

Homoj havas du fundamentajn trajtojn. Unuflanke, urĝo esplori, enketi, ekzameni aferojn; resume, pensi. Aliflanke, bezono por certeco kaj stabileco. Ni havas elekton: pensi - aŭ sinki por kvieta vivo.

Vilĉjo Simcock

NEKROLOGO

La 23-an de oktobro 2004, mortis en Le Pallet (FR), 77-jara, nia malnova membro, kamarado

Henri MENARD
(matr. 32.487)

Li mortis post kelktaga enhospitaliĝo. La fino estis rapida. Li estis aktiva ĉefe en ICEM-Esperanto (pedagogio Freinet) kies samnoman organon li redaktis kaj presis, kaj ankaŭ membro de SAT kaj de SAT-Amikaro. Bona kaj tre kapabla homo kaj pedagogo forlasas nin. Ni vidis lin lastfoje en la kongreso de SAT-Amikaro en La Roche-sur-Yon. Ni kondolencas al lia edzino Huguette, al ilia familio kaj al ĉiuj, por kiuj li estis kara. Multnombraj estis liaj geamikoj tra la mondo.


***

La 8-an de aprilo 2004 forpasis en Kazanlak (BG), nia malnova, fidela membro, 95-jara, kamarado

Ganĉo Lazarov DAMJANOV
(matr. 22.776)

Dum pluraj jardekoj li estis nia peranto en Bulgario kaj li organizis en 1993 SAT-kongreson en Kazanlak. Por li esperantismo kaj anarĥiismo estis idealoj al kiuj li restis fidela ĝis la fino de sia vivo. Ni kondolencas al lia filino, nia kamaradino Svoboda kaj al ĉiuj geamikoj.

Alia vizaĝo de Kroatio



Dum la jaro 2004, en Francio kaj eble en aliaj landoj, oni multe faris reklamon pri Kroatio. Oni laŭdis la belecon de la Adriatika marbordo, la historiajn riĉecojn de tiu lando por favori la turismon. Dum la lasta kongreso de SAT en Bratislava oni prezentis fotojn kaj dokumentojn pri Zagrebo, ĉefurbo de Kroatio. Oni ankaŭ montris la etan ferivilaĝon en kiu la partoprenantoj en la 78-a kongreso gastos. Zagrebo estas tre bela urbo kaj la eta ferivilaĝo, en ĉirkaŭaĵo de Zagrebo, havas ĉiujn ecojn por bonega restado. Mi volas ĉagreni neniun sed mi volas montri en tiu artikolo alian vizaĝon de Kroatio antaŭ nia estonta kongreso. Mi nur konas Kroation dank'al laboro, kiun mi faris, kiel membro de SAT kun Kroata Esperanto-Ligo. Tiu komuna ago celis francan helpon por senminigo en Kroatio.

Kroatio

Antaŭ ol mi rakontas la bildon, kiun mi havas pri Kroatio, mi rememorigas, ke tiu lando estis milite atakita de Jugoslavia armeo en la lasta jardeko de la pasinta jarcento. Pri tiu periodo mi konsilas al la SAT-anoj la bonegan libron de Spomenka Ŝtimec : « Kroata Milita Noktlibro ». Tiu libro priskribas la vivon, la angoron, la timon kaj la turmentojn de loĝantoj en Kroatio dum tiu milito.

Minita lando

La surfacamplekso de Kroatio estas ĉirkaŭ 56 700 km². La minitaj zonoj vastiĝas sur 14 distriktoj kaj Kroatio nombras 21 distriktojn. La suspekta poluita surfaco pro minoj estas 1630 km².

Kroatio subskribis kaj ratifis la Konvencion de Otavo . Tio devigas Kroation tute senminigi la landon antaŭ 2010. Februara 1998 registara dekreto kreis CROMAC (Kroata Centro por la Ago kontraŭ la minoj), kaj ties taskoj estas la planizado kaj la organizado de la ago kontraŭ la minoj sed ankaŭ : edukado pri la danĝero de minoj, asistado al la viktimoj de minoj, reedukado kaj reveno de vunditaj personoj en la socian vivon, serĉado kaj projektoj pri novaj teknikoj de senminigo, internacia kunlaboro.

CROMAC taksis, en 2003, 700 000 minojn kaj UXOjn (UXO estas armilo ne-eksplodita) dissemitajn sur la suspektaj zonoj, kaj laŭ CROMAC de 1991 ĝis 2003, 1843 personoj estis viktimoj pro minoj, kaj inter tiuj ĉi 414 mortis. La kontraŭpersonaj minoj estas obstaklo al normala vivo kaj al la progreso.

La meza kosto de senminigo en Kroatio estas ĉirkaŭ 1,60 Eŭro/m². Tiu kosto dependas de pluraj faktoroj : aspekto de la tereno, alirejo, denseco de minoj. La kosto por realigi la totalan senminigon de suspektaj zonoj estas 2 500 milionoj da Eŭroj. La precipa financa fonto por la ago kontraŭ la minoj estas ŝtatobuĝeto. La financa ŝtata partoprenado pligrandiĝas ĉiujare, en 1998 la ŝtato asignis 6,7 milionojn da Eŭroj, kaj en 2002, 22 milionojn da Euroj por la senminigo. Aliaj financaj fontoj aldoniĝas al tiuj de ŝtato: financaj helpoj de publikaj societoj, pruntoj, donacoj. De 1998 ĝis 2002 pli ol 100 milionoj da Eŭroj estis elspezitaj por la senminigo. La fremdaj donacoj konsistigas ĉirkaŭ 10% de la tuta elspezo.

Malgraŭ grava klopodo de Kroata Ŝtato por senminigi la landon, kelkfoje la kamparanoj mem senminigas siajn kampojn. Kroata Esperanto-Ligo donis al mi ekzemplon pri loĝanto en la vilaĝo Skakavac ĉe la rivero Kupa en la centro de Kroatio. Tiu vilaĝano senminigis sian fruktejon helpe de sia najbaro kaj liaj du filoj, kiuj havis kelkajn konojn pri la minoj post ilia militservo. Ili trovis 7 kontraŭpersonajn minojn sur la agro.

La situacio en aliaj balkaniaj landoj

Bosnio-Hercegovino

Tiu lando sendube estas pli minita ol Kroatio. Laŭ miaj informoj, estas en ĝi : ĉirkaŭ 18 000 kampoj de minoj sur kiuj estas dissemitaj pli ol 1 miliono da kontraŭpersonaj minoj.

Kiam, en majo 2003, mi skribis al Kroata Esperanto-Ligo, por proponi komunan agon por altigi la financan helpon de Francio al Kroatio por la senminigo, mi samtempe skribis saman leteron al Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino. Kroata Esperanto-Ligo respondis, Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino neniam respondis. Mi bedaŭras tiun foreston de respondo, ĉar mi ne havis sufiĉe precizajn informojn por ke la franca deputito Francisko Rochebloine, membro de la Nacia Komisiono por la Elimino de Kontraŭpersonaj Minoj kun kiu mi laboras pri la temo, intervenu en tiu komisiono.

Ni notu ke Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino estas membro de SAT, kaj Kroata Esperanto-Ligo ne estas membro de SAT ! ? …

Serbio-Montenegro

Kosovo estas precipe poluita pro minibomboj. La minibomboj estas ĵetitaj el bomboj aŭ obusoj, kiuj eksplodas super la tero kaj disŝutas la minibombojn sur ĝin. De 5% ĝis 30% de minibomboj ne eksplodas kiam ili frapas la teron, sed poste ili eksplodas pro ne-intenca kontakto aŭ manipulado. Tiam ili funkcias kiel kontraŭpersonaj minoj. Minibomboj estas sferaj kaj pezas 450 gramojn. Aliaj estas cilindraj kaj pezas 1200 gramojn. Ĉirkaŭ 300 000 minibomboj estis disĵetitaj sur Kosovo, 250 000 sur Afganio, 1,8 miliono sur Irako. Ankaŭ estas minibomboj en Albanio, Etiopio, Laoso.

Pri aliaj regionoj de Serbio-Montenegro mi havas nenian informon. Eble SAT-anoj de tiu lando povus alporti ĝin.

Por la estonta Kongreso de SAT en Zagrebo

1-a rimarko : La landoj, kiuj subskribis la Konvencion de Otavo rifuzas ke armiloj, kies nomo ne estas kontraŭpersonaj minoj, enirus en la kampon de la Konvencio. Do la minibomboj estas ekster ĝi.

2-a rimarko : La landoj, kiuj subskribis la Konvencion de Otavo, same tiuj, kiuj ne subskribis ĝin, fabrikas, vendas kaj uzas minibombojn.

3-a rimarko : La deputito Francisko Rochebloine transdonis al la franca Nacia Asembleo leĝoproponon, kiu malpermesas uzi, fabriki, vendi minibombojn.

4-a rimarko : Kroatio estas minita lando kaj minitaj landoj ĉirkaŭas ĝin.

5-a rimarko : Kroatio devus organizi la estontan kunvenon de ŝtatoj, kiuj subskribis la Konvencion de Otavo.

Tiuj rimarkoj kaj la estonta Kongreso de SAT, kiu okazos en Zagrebo jam kondukas min proponi por la deklaracio de la 78-a Kongreso la du paragrafojn ĉi-sube :

La 78-a Kongreso de SAT…..

- denove petas, ke la landoj, kiuj ne ankoraŭ subskribis la Konvencion de Otavo, rapide subskribu ĝin ;

- petas inkludi en la kampo de la Konvencio de Otavo la kontraŭpersonajn minibombojn, kiuj estas ĵetitaj per fragmentbomboj aŭ fragmentobusoj.

Eble, la Kongreso povus ankaŭ sendi al la Kroata Registaro, estanta organizanto de la estonta kunveno de ŝtatoj kiuj subskribis la Konvencion de Otavo, la parton de la Deklaracio, kiu rilatas minibombojn kaj la Konvencion aŭ eĉ la tutan Deklaracion.

La debato estas malfermita pri la propono de tiuj du paragrafoj kaj pri la propono de la ago.

André Weiss (35 366)

Viaj opinioj....

Respondo al k-do Kani

En la oktobra numero 2004 de "Sennaciulo" k-do Kani (José Maria Salguero) bonvolas komentarii la unuan paĝon de "Heroldo de Esperanto" n-ro 2058 (11:2004), kaj specife du artikolojn. La dua, al kiu Kani dediĉas malgrandan parton de sia interveno, estas la "Alvoko por nova maldekstro", kiun la koncernatoj sendos ankaŭ al "Sennaciulo" por aperigo kaj diskuto -- ja ne eblas komentarii tion, kion la legantoj ne vidis.

La unua estas artikolo pri la SAT-kongreso en Bratislavo. Nur al la ĉi-koncerna ni reagas ĉi tie.

La peco pri Bratislavo konsistas el kvar elementoj: titolo, bildo, dokumento, komentario.

La titolo formulas hipotezon, kun demandosigno, do ne esprimas opinion: "Ĉu Bratislavo relanĉis la klasisman matricon de SAT?".

La dokumento estas la kongresa deklaracio, kompreneble reproduktita SEN MODIFOJ: HdE estas la sola gazeto ekster SAT kiu reproduktis ĝin, kiel ĝi kutimas fari pri ĉiuj iom atentindaj deklaroj en Esperantio. La tria paragrafo de la deklaracio klare relanĉas la aktualecon de "klasbatalo", konsekvence pravigas la titolon elektitan por la tuta peco.

La bildo pri Lenin, kiu tiom ofendis s-ron Kani, vi trovas ĉi-apude. La legantoj juĝu mem, en kio ĝi povas ofendi leninismon. Cetere, neniu plendis kontraŭ la bildo aŭ alia parto de la peco, escepte de Kani.



La lasta elemento, nome la teksto, estas komentario pri la kongreso, surbaze ankaŭ de informoj el Stan Keable. La interveno de Kani montras, ke li ne havas adekvatan scion pri la situacio en SAT, aŭ simple li mensogas, ĉar kiel loĝanto en Hispanio li ne povas ne koni la konflikton internan al la tiea SAT-anaro, specife inter Bustin kaj de las Heras. Veante kontraŭ aserto pri "prisilentata demisio de kelkaj membroj", Kani ne haltus ĉe la kazo Lépeix, se li estus honesta: li demandus kiuj estas la aliaj membroj -- tiam oni trankvile povus mencii la tutan problemon kun la Plenum-Komitato, kiu kondukis al la demisio de ges-roj Kaiser, ekzemple. Veante kontraŭ la aserto pri lastatempa tendenco en SAT "doni la parolon al unuj (precipe se anticivitistoj) kaj ne al aliaj", se Kani estus honesta, li devus postuli pruvojn: jen tuj unu -- "Sennaciulo" neniam aperigis la oficialan, tute ekvilibran respondon de OKK en Ĉaŭdefono, al la asertoj de Bustin kaj de Duc Goninaz.

Nur en unu afero Kani pravas: jes, la eventualaj diverĝoj interne al la Esperanta Civito estas simptomo de demokratia diverseco -- en ĝia Parlamento neniam oni aŭdas la insultojn, je kiuj kutimigis la publikon la lastatempa historio, ekzemple, de la Estraro kaj de la burokrataro de UEA. Demokratio havas sian fundamenton sur la respekto por la kontraŭulo, eĉ kiam mankas estimo. Kaj tion oni konstatas en la Parlamento de la Esperanta Civito.

Marie-France Conde Rey
Perla Martinelli

Eduka foiro "Educatec"0 en Parizo

Rusa, angla, araba, portugala, hindia, franca, hispana, esperanta lingvoj kunludas egalece !


La ideo, ke Esperanto aperu en diversaj budoj de foiroj, estas tute subteninda, kaj dank'al Rene Ballaguy tio okazis dum eduka foiro Educatec, en Parizo, inter la 17a kaj la 19a de novembro 2004a.

Gerard Claes, estro de A6-Mediaguide, subtenas Esperanton kaj imagis ludon por valorigi sian programilon Mediatrame, per kiu oni prilaboras diverslingvajn instruprogramojn. Dum tritaga «Omeriado 2004», junuloj manipulis Mediatrame por, responde al tre ĝeneralaj demandoj, krei interesajn ligojn inter bildoj kaj diverskulturaj esprimoj. Ĉiu laboris en la propra lingvo: angla, franca, hispana, portugala, rusa, araba, hindia kaj... Esperanto.

Temas pri unua eksperimento. Necesos estonte pliklarigi la celon kaj konsiston



de la ludoj. Kiom gravas la diversaj kriterioj: riĉeco de la produktita enhavo, originaleco aŭ poezieco de la esprimoj, manipulado de bildoj, prizorgado de enpaĝigo... Kelkaj ne kutimis la klavaron, ekzemple reprezentanto de la Hindia kutimis tajpi nur angle. En serĉado de




proverboj, denaskuloj havas avantaĝon, kaj tio koncernis ne nur Esperanton. Ankaŭ kelkaj aliaj partoprenantoj ne parolis sian lingvon denaske. Por la franca venis interalie Afrikaninoj, kiuj elpensis Afrikajn proverbojn. Cetere la lingva flanko ne povis esti prioritata, ĉar la juĝantaro ne scipovis ĉiujn ok lingvojn.

Krome restas demando, ĉu temas pri konkurso aŭ plurkultura kunlaboro, kaj indas plibonigi la komunikeblecon inter la komputiloj de la reto. Tamen tiu ĉi unua eksperimento estis valora. La firmao A6-Mediaguide havas apartajn rilatojn kun Alĝerio: vizitis nin unu el la fratoj de prezidento Boutaflika, kaj la nacia Alĝera televido demandis min pri Esperanto, ĉar en la unua tago Esperantistino Ludivine Delnatte brile sukcesis. Ankaŭ kun reprezentantoj de UNESKO mi havis utilajn diskutojn, kaj kun la programorganizanto de la foiro Educatec.

Do bela eksperimento daŭriginda, plibonigินda... kaj imitinda!

François Lo Jacomo

SAT - Kulturo





redaktanto
Cirilo

LA EFEMERA PADO

Povra eŭropano mi estas ! Ni, la eŭropanoj, ŝategas plenigi nian vivon per senfinaj paroladoj, kiuj mem naskas senfinajn oratoraĵojn kaj ni beate admiras tiun gigantan verkon kovritan per laŭdoj kaj ŝovinista fiereco. Oni nomas tion: nia scienco, literaturo, arto, la spirito de la epoko... Unu aŭtoro diras :"Mi verkis sepcentpaĝan romanon !" kaj alia :"Mi jam komponis dek operojn !" Kaj ĉiuj estas majstroj en la arto de la hipokritaj gratulegoj. Verdire, estas nia suprema arto.

Kion ili scias pri la leĝereco, simpleco kaj la spontanea florado de la evidenteco kiun kaŝas humila hajko? Ja, mi preferas legi Baŝoon ol Racinon, trovante en la unua pli da animprofundeco. Sed lasu min gvidi vin en la delikata mondo de ĉi tiu japana arto kie regas la neesprimeblaj, efemeraj, pasantaj kvalitoj de la vivo, kie regas la perspektivoj, la hazardo aŭ la neceso.

Kiu ne scias bone marŝi, tiu ne povas verki hajkon. Ja, en la jaro 1760 la famega hajkisto Baŝoo verkis "Regularon de la poeta pilgrimo" en kiu li skribis :

Ne dormi pli ol du noktojn en la sama gastejo .
Ne surhavi armilojn. (Baŝoo studis la batalarton de la samurajoj).
Manĝi simplan nutraĵon.
Ne montri siajn poemojn, se iu ne petas. Neniam rifuzi, se iu petas.
Ne rajdi ĉevalon sed apogi sin sur bastonon.

La arto de la hajko estas la arto de la vagado, "la tutfeliĉa nesekureco". Lasi la mondon resoni en vi kaj trovi fragilan neston en nia malpreciza lingvaĵo, agnoski ke la versoj mensogas ekde kiam oni provas transskribi fuĝantan eventon. "Kiu volas tro diri, nenion diras." Tiel parolas la saĝulo. La hajko karesas la intiman esencon de`la aĵoj :

Aŭskulti la insektojn
Aŭskulti la homojn
Ne samaj oreloj

Je ĉiuj estaĵoj kaj eventoj de la vivo la hajkistoj ŝanĝas sian perceptokapablon. Sentoj, sezonoj, bestoj, la hajko leĝere fluas meze de ĉio. Dolĉa energio de la vortoj ...

Malplena botel'
Blinda oldulo
Vintra sun'

Kusatao

Reveninta la falko
En ĝia okul'
La suno

Tairo

Puloj de mia kabano
Vi malgrasiĝas
kompatigas

Isa

Ĉiuj dormas
Neniu inter
La luno kaj mi

Seifujo

"Kial fermi tion, kio petas resti malfermita ?" Ni preskaŭ tuŝetas la kvintesencon de ... de kio? Neniu scias. La mondo havas novajn kolorojn, ĝi ŝajnas pli malpeza. Ĉio estas trankvila malgraŭ la dramoj, kiujn ni spektas, malgraŭ la bedaŭroj, sed la realeco ĉiam estos mistero.

La fiŝreto
Ne kaptis
La reflekton de la steloj

Kinŝa

La moderna leganto ofte pensas ke la hajko estas pasiva kaj naiva medito. Oni forgesas ke ĉi mallonga poemo kelkfoje denuncas la malvirtojn de la homoj kaj elŝteliĝi el la komunaj interhomaj rilatoj estas danĝera elekto, kiun la solema, gapema poeto ofte pagas per sango kaj ŝvito. Mi ankaŭ opinias ke, por sennaciulo, sencele vagadi kaj priatenti la grandajn kaj etajn fenomenojn de nia Tero estas plia ilo de emancipiĝo.

Eĉ
Kiam mortantis paĉjo
Mi furzis

Yamazi Sokan

Flava makulo
En ĵusfalinta neĝo
*Ho, la aĉulo ! **

Kikaku

Sidas sur pendolo
*Viktimo de la bombo***
Morta knabino

Takaŝima Ŝigeru

Feliĉe, la erotikaj hajkoj ekzistas :

Tute natura afero
Fingron ŝi trempis
En varmeta sake'

anonima

Forgesu do la rimojn kaj, kial ne, forgesu la ritmon 5/7/5 de la hajko. En sako kunportu kelkajn fruktojn, iom da pano kaj fiŝkaptilon. Rompu vian horloĝon kaj marŝu, admiru, aŭskultu kaj, precipe, ekskuzu min ĉar mi mem aldonas vanan vortogirlandon al la parolado, kiun mi prifajfis. Mi nur estas eŭropano...

Cirilo Orsinger
<oraastro@hotmail.com>

*Kalocsay senutile rimigas la hajkojn. Kompreneble, la Parnasa Gvidlibro ankaŭ. Ĉu ne temas pri aĉa, peniga eŭropa manio ?
**Temas pri Hiroŝimo !

Lucija Borčić

Kiam juna homo

Kiam juna homo
venas gaste en la hejmon
de okdekjarulo
kaj post si postlasas
kaoson, detruon,
kaj ŝtelospurojn,
ĉu troveblas esprimo
klariganta tiun agon?
Ĉu nomi ĝin aroganteco,
deturemo, vandalismo,
esktrema malrespekto
al la maljuna gastiganto,
aŭ ĉeesto de besto en homo,
aŭ foresto de animo homa
en la homo.
aŭ ĉu tio kune?

La avina domŝlosilo

En mia vilaĝo
oni ne kutimis
ŝlosadi la pordojn.
Ŝlosilon ja ne ĉiu havis!
Kiam mia avino
eliris el sia hejmo
la domŝlosilon ŝi pendigis
ekstere sur la pordon,
ke oni sciu,
ke ŝi ne estas hejme.

Komence de ĉi dudeka jarcento

Iam komence
de ĉi dudeka jarcento,
kiam regis malhavo-inundo
de ĉio krom infan-abundo,
miaj najbarinoj laboregis
permanente.

Bredis ili kontraŭ mizer-barakto
du-tri kaprinojn aŭ ŝafinojn
kaj kelkajn kokinojn.

Ne trinkis ili la lakton,
nek manĝis la ovojn,
sed ilin ĉiam antaŭ aŭroro
portis piedire pli ol horon
surgrimpante, descendante
tra l' ŝtonaro kaj vepro du montetojn
al la havena urbeto,
senkonsidere al enormo
de l' vento, pluvo aŭ ŝtormo.

Ĉar ne licis ke la riĉbienulaj klientoj
kaj iliaj infanoj
dum la
mantenmanĝo mankosentu
sian lakto-kafon aŭ okul-ovaĵon.

Revenante
sub arda
suno
ili hejmen
portis
farunon
por la
ĉiutaga
pano
kaj oleon
por aspergi
laŭ eblo
faskon da
legomoj aŭ
manĝebla
herbo.



Mile Prpa

Mortintaj ministoj

Ili antaŭenpaŝas, karbidlampojn levas-
en la kavo gaso flamiga, senodora.
La malnovan nova skipo ŝanĝi devas
-eniri minejoj, sombron koridoran.

Avancas fumvizaĝoj, kovras ili ŝvito.
Sombra kolon' iras kun pioĉ' sur



ŝultro.
Sur la mont' profunde marŝas ĝi kaŝita,
jen, krak' aŭdiĝas! Ekestas tumulto!

Tim' kaj fum' kunfandas, fajra ard' ĉieas-
tutkorpe sentatas egaj brulovundoj.
Disrompitas ĉio, eĉ mortintoj ĉeas.

Nur iu ekrio – dolorve' profunda.
La polvo alfundas, ekregas silento
-en karbar' jen kuŝas la minista gento.

Elkroatigis: Lucija Borčić

Zora Heide

Al mia patro

Sur la sceno de la vivodramo
sepdek jaroj glore vin brakumas
en la rolo de bonkora homo
vi fariĝis aktoro
Antaŭ vi ekran' de l'pasinto
flusas kvazaŭ tajdo de l'fato
post vagado sur vojoj cirkvitaj
vin invitas cirklo rememora
Florar' printempa burĝonoj sopiraj
varmeca somero laboroj martiraj
abunda aŭtun' rikolta trezor'
riĉa ornamo por vintra dekor'
interne de l' cirklo dolora
Fiera estu pro omaĝoj oftaj
benataj estu doloroj adoptaj
de ter' ĉargrenuloj
kredante naive al ĉies sincero
vivante kun firma espero
ke harmonie plena
cirkulos tera globo

Ecce homo!

Mi estas prapatro de la grota ido
mia frato estas Dia filo
en mia sino kuŝas
neŭtrona bombo
sur mia tombo
nur
ecce homo!

Dobriša Cesarić (1902-1980)

Fruktarbo post pluvo



Jen fruktarbeto post la pluvo
plenas je gutoj kvazaŭ post diluvo
kaj briletadas, lume ekradias
mirinda lukso de la arbo krias.

Sed se nur ete kaŝiĝas la suno
tuj ĉesas bunta miraklo de la nuno.
Ĝi estas ree tute sen farbo
simpla kaj eta, povra arbo.

Elkroatigis: Zlatko Tišljar

daŭrigo de la paĝo 2

Irassyaimase !
(bonvenon!)

spertos dum la sekvaj 3 semajnoj.

La unua afero kiu frapis min en Kansai flughaveno estis la varmeco kaj giganta, laŭ belga normo, humideco. La oficejo por ŝanĝi monon ankaŭ ne funkciis kaj mi ne



Bonega matenmanĝo kun Minoru, edzo de Masakato, en ilia gastema domo.

vidis Masako-n, sed tion kaŭzis la fakto ke la aviadilo alvenis 20 minutojn pli frue ol antaŭvidite kaj veraj problemoj kun doganoj ankaŭ ne okazis. Entuta gajno estis eble 30 minutoj antaŭ la konsentita tempo kiam mi jam staris en la halo de alvenintaj pasaĝeroj kun granda valizo, 9 kilogramoj da libroj, "Vivbruligita" kaj "Hundo de Flandrio", kaj teko plena de paperoj de 5 diversaj prelegoj kiujn mi intencis fari.

Miajn okulvitrojn mi ne surhavis kaj pro tio ne vidis Masako-n kiu alvenis kun granda rapideco, al ŝi tre kutima, mi poste spertis.

Laŭ antverpena kutimo mi kisis ŝin 3 fojojn. Mi estis fine en Japanio ĉe amikoj, kamaradoj de SAT. Nenio grava okazis. Aviadiloj restis en la aero kiel antaŭvidite kaj neniu eksplodo pro terorisma bombo, neniu fripono klopodis akapari la maŝinon. Denove George Bush malpravis ke la tuta mondo estas plena de teroristoj, sed al Usono ni revenos poste kiam mi rakontos pri mia vizito al Hiroŝima.

"Superekspresa trajno HARUKA alportos nin al Kioto", diris Masako kaj ni eniris tre luksan trajnon kie lokoj abundas.

Diable mi estis terure laca post longa vojaĝo. "Ĉu longan distancon ni devas trajni", estis mia demando al Masako. Pli ol 1 horon, mi aŭdis, sed nu, ne gravis, mi komforte sidis kaj nenio povas okazi. La trajno veturis kun granda rapideco de Kansai-flughaveno al la centro de Kioto. Strange, mi pensis, kiel proksime al la domoj la trajno veturas. De tempo la distanco estis eble ne pli ol 15 metrojn inter la trajno kiu rapidis pli ol 100-km-ojn hore kaj la domoj. Plejmulto el la domoj estis faritaj el ligno kaj strange ili ne estis konstruitaj unu kontraŭ alia kiel estas la kutimo en Eŭropo, sed kun spaco de pli malpli 50 centimetroj inter du konstruaĵoj. Kion mi ne konas estas al mi fremda, sed mia scivolemo devigis min demandi, kial domoj en Japanio ne apogas sin unu sur la alian kiel en mia kontinento. "La problemo de tertremoj" respondis mia Masako, kaj mi jam povis montri ke mi hontas pro mia stulteco.

Neatendite la trajno ekhaltas. Por mi uzanto de publika transporto en Belgio, tutnormala afero. Masako, nu ne vere nervoziĝis, sed demandis sin kio okazis. Poste mi lernis ke en Japanio trajno ne simple haltas. Trajno nur haltas atinginte iun celon, pro katastrofoj kiel tajfuno aŭ tertremoj. Ok minutojn la trajno perdis pro neniu kaŭzo, certe ne pro indikebla kaŭzo.

Sur malgranda ekrano aperis teksto, en la japana evidente, ke persono sinmortigis ĵetante sin antaŭ alveninta trajno en la stacidomo de Kioto. Oni petis mil pardonojn pro la malfruiĝo kaj promesis kuratingi kiel eble plej rapide laŭ skemo de la horaro.

La giganta stacidomo de Kioto estas de itala



En la sidejo de KLEG (Kansaja Ligo de E-Grupoj). De maldekstre: Mine Yositaka (libroservanto), nia peranto Tani Hiroyuki kaj Tahira Masako.


arkitekto kaj la temo ĉirkaŭ kiu oni konstruis ĝin estis "La medio de energetika urbo de kulturo". La stacidomo donas konekton al la plej multaj urboj kaj lokoj en Japanio kaj ĝi vere estas arkitekta artaĵo, kiel mi poste dum vizito malkovris.

Aŭtobuse ni iris al la domo de Masako, kie ni alvenis post 20 minutoj. Malgranda laborista domo, kiel Masako priskribis sian hejmon. Domo tute el ligno. Mia dormĉambro troviĝis sur la unua etaĝo kaj havis grandan fenestron al la strato.

"Ni trinku teon kaj poste vi povos iom ripozi" diris mia gastiganto. La teo estis verda kaj bongusta. Denove en la dormoĉambro mi estis kaptita de emocioj. La knabo kiu timas vojaĝi estis nun en Japanio, imagu. Mi denove pensis pri Marjorie Boulton.

Jakvo

daŭrigota.



S.A.T. EN BRITIO
INVITAS VIN

13 – 15 majo, 2005 al nia venonta kunveno ĉe Wedgwood kolegio (sidejo de la Esperanto Asocio en Britio kaj de la Esperanto biblioteko).

Atilio Rojas, la konata Cseh instruisto, estos nia gastpreleganto. Li parolos pri "Amerikaj indiĝenoj – ekspluatado, genocido kaj forgeso" kaj pri "Agado Espero".

La semajnfino estos, kiel ĉiam, tre varia kaj stimula. Por pluaj detaloj, kontaktu:-

Anglalingve-
Wedgwood Memorial College
Barlaston
Stoke on Trent
Staffs. ST12 9DG
Britio
Tel.0044-1782-372-105/0044-1782-373-4278
Rete:- Wedgwood.college@staffordshire.gov.uk

Esperantlingve:-
Ron Lynn
15 Canterbury House
Royal Street
Londono SE1 7LN
Britio
Tel.0044-207-620-2950
Rete: ronsnafulin@aol.com

Al unu reprezentanto el ĉiu SAT LEA, ni ofertas SENPAGAN RESTADON, nur dum la SATEB semajnfino. Ankaŭ pri tio, kontaktu Ron – vidu supre.



El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris

Reeldono de Nova PIV

korektita kaj ĝisdatigita

La unua eldono de Nova PIV elĉerpiĝis kaj ni estos devigataj reeldoni ĝin. Intertempe estas korektitaj eraroj el la unua eldono kaj la nova eldono aperos korektita kaj ĝisdatigita. Bedaŭrinde, por tiu nova eldono, nia Asocio ne disponas pri sufiĉe da mono. Pro tio ni decidis malfermi

FONDUSON

por reeldono de Nova PIV

Ni invitas SAT-anojn kaj ĉiujn esperantistojn kontribui al tiu fonduso kaj tiel ebligi la reeldonon de PIV. Pro nesufiĉa nombro de niaj membroj el kiuj eĉ granda parto pagas nur simbolan kotizon, la vendo de PIV grave helpas al la financa ekvilibro de nia asocio kaj ĝia normala funkciado. Esperante vian komprenemon kaj malavaran partoprenon en tiu nia entrepreno, ni anticipe dankas al ĉiuj.

*****

De tiuj gekamaradoj, kiuj eventuale estas pretaj prunti la monon por tiu ĉi reeldono, ni akceptas


PRUNTON

kiun ni repagos post la vendo de la reeldonita PIV. Elkoran anticipan dankon al ĉiuj partoprenontoj en tiu kampanjo.

La P.K. de SAT



FONDUSO NOVA PIV
Westermayer 19,00€



HELPO AL LA ASOCIO
R. Haberland 18,00 €; J. Schram 200,00 €;



NOVALIĜOJ
35.710 *MANIĆ Danijela, Krste Stefanovića 2, YU-18000 NIŠ, Serbio-Montenegro
35.711 MANIĆ Petar, Krste Stefanovića 2, YU-18000 NIŠ, Serbio-Montenegro
35.712 *MANIĆ Radmila, Krste Stefanovića 2, YU-18000 NIŠ, Serbio-Montenegro
35.713 FRANCESCHI Filippo, Casale Veano 9, IT-29020 VIGOLZONE (PC), Italio

KOTIZOJ - ABONOJ DE LA JARO 2005

NEPRE ATENTE LEGU LA ĈI-SUBAJN RIMARKOJN

* Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas SENNACIULON + ĝian jaran suplementon, S.R.
* El la indikita sumo, 40 % estas la kotizo, 60 % la abono.
* **Malriĉaj emeritoj**, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, **senlaboruloj kaj junuloj** (ĝis 25j.) pagas **minimume** la duonon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
* Help- kaj grupmembroj pagas **minimume** la duoblon de la plena kotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
* Samfamiliano de membro pagas la duonon de la plena jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekz. dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon.
* Pagante la sumon aparte indikitan, nemembro povas aboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon «Sennacieca Revuo».

Landaj perantoj	Valuto	Kotizo + abono	Nura abono
Argentinio : Rodolfo Calogero, Namuncura 1749, AR- Q 8302 AOW Neuquen.	€	27,00	29,00
Aŭstralio: Bernie Heinze, 1 Marne Rd., Mount Evelyn, Vict.-3796. Reto: <franciska@bigpond.com>	€	52,00	57,00
Aŭstrio : Dr. Klaus Karner, Krebsbach 371, AT-6414 Mieming, pĉkt.-3799.466 (Oester. postsparkasse, Wien, konto 000-0025223-03)	€	52,00	57,00
Belgio : Jacques (Jakvo) Schram, 49 Hofter Bekestraat, BE-2018 Antwerpen. Reto: <jakvo@mac.com> Poŝtkonto: 000-1692025-54	€	52,00	57,00
Bosnio-Hercegovino : Ivica Horvat,Žrtava fašizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo. rete: <ivicah@lsinter.net>	€	8,00	9,00
Brazilio : José Joaquin Lunazzi, rua Manoel Antunes Novo 668, BR-13084-157 Campinas-SP. Rete: <lunazzi@uol.com.br>	€	22,00	25,00
Britio : Arthur Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex, CM13-1EJ (Tel.: +44.1.277.22.89.62) Rete: <arturo@signalprent.demon.co.uk>	GBP	35,00	38,00
Bulgario : Ivanka Stojanova, P.O.Box 701, BG-9000 Varna. Rete: <ivanka_esperanto@abv.bg	€	9,00	10,00
Ĉeĥio : Vaclav Stiburek, J. Franka 1731, CZ-25601 BENEŠOV rete: <stiburek.v@mybox.cz.>	€	20,00	22,00
Ĉinio : Wang Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Jian-Gong-Lu 8 hao, CN-710043 Xi'an. Tel:0086-29-2242215, fakso: 2622952, Rete: <esp@pub.xaonline.com>	CNY	45,00	48,00
Danio : Ulrik Rasmussen, Nörregärdsvej 66, DK-2610 Rödovr□			
Estonio : Freed Neeme, Kooli 6-26, EE-2240 Kehra.	€	10,00	11,00
Finnlando : Vakas	€	52,00	57,00
Francio : Pierre Quillaud, 16 rue du Lt.-Vaisseau Paris, FR-76120 Le Grand Quevilly, pĉk.-SAT Peranto n° 17 333 10 N, Paris. Reto:<quillaud.p.mt@wanadoo.fr>	€	52,00	57,00
Germanio : Jiri Proškovec, Heimbau Str. 10, DE-44143 Dortmund,Konto n° 4 907 664100, Bankkodo: 760 260 00 NORISBANK:. Reto: <proskovec@yahoo.de>	€	52,00	57,00
Hispanio : Pedro Sanz, Apartado de correos 8042, ES-28042 Madrid. Konto: 0227-0001-85-0200526929 elektronika banko BBVA. Reto:<pmariass1@mi.madritel.es>	€	36,00	40,00
Hungario : Béla Kovacs, Béla kiraly u.-44, HU-7400 Kaposvar. Ĝirkonto 11773432-04632175. rete: <espbela@axelero.hu>	€	10,00	11,00
Italio : Carlo Bourlot, Via Quarello 40, IT-10135 Torino(TO) Tel: 011-3970477 (vesp. ĝis 23h), Poŝtbanka konto n° 43976158. rete:<c.bourlot@libero.it >	€	50,00	54,00
Izraelio : Jehoŝua Tilleman, 97-A, Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin.	€	32,00	36,00
Japanio : Hiroyuki Tani, Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561 Toyonaka-si.-Pĉk.-00980-9-37624, SAT-Nihon. Reto: <tnhryk@pop07.odn.ne.jp>	JPY	8400,00	9300,00
Kanado : Vakas	CAD	79,00	86,00
Koreio: Choi Manwon, P.O.Box 18, Guang-Ĵu, KR-501-012 Seoul	€	33,00	36,00
Kroatio : Zdenka Svetličić, Matoševa 6, HR-10410 Velika Gorica, reto: <sat_hr@yahoo.com>	€	12,00	13,00
Kubo : Jorge L. Santillan, Apartado 400, CU-70100 Camagüey 1, Cuba, rete:<caliturcuba@yahoo.es>		ne difinita	
Latvio : Margarita Zelve, Rupniecibas 35+13, LV-1045 Riga-45	€	10,00	11,00
Litovio : Gražina Opulskiene, Tylioji 32-22, LT-89307 Mažeikiai, rete:<grazopul@yahoo.com>	€	10,00	11,00
Malagasio : Justine (Lala) Ralalarisoa, Lot IIC-72-FD Manjakaray,MG-101 Antananarivo. Bankkonto: Ralalarisoa Justine, n° 010594738020000 BNI-CL 101 Antananarivo.	€	3,00	4,00
Nederlando : Corrie Kwantes-Kooij, Marnixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem, pĉk. 2853752.	€	52,00	57,00
Norvegio : Per Engen, Østregate 14, H0203, NO-2317 Hamar.	€	52,00	57,00
Pollando : Elzbieta Janusz, ul.-Krowoderska 74/3, PL-31-158 Krakow, Bankkonto : BPH III O/Krakow 71 1060 0076 0000 3000 0177 7438	€	10,00	11,00
Portugalio : Manuel Luis Pedrosa Alves, Estrada Principal n° 79, PT-2710 -413 Morelinho-Sintra. Rete: <manuelalvespedrosa@clix.pt>	€	30,00	33,00
Rusio : Nikolao Gudskov, a/k 57, RU-105318 Moskvo, Reto: <nikolao@orc.ru>	€	10,00	11,00
Serbio-Montenegro : Ivan Močilnik, Požeška 132, YU-11030 Beograd.	€	10,00	11,00
Slovakio : Miro Zavodsky, Juraja Zavodskeho 67, SK-01004 Žilina-Zavodie.	€	12,00	13,00
Slovenio : vakas	€	12,00	13,00
Svedio : Inga Johanson, Stampgatan 60.B.-127, SE-411 01 Göteborg, pĉk.-SAT c/o I.-Johanson, n°-26-63-22-7. Rete: <sat_sverige@yahoo.se>	€	52,00	57,00
Svisio : Erna Döring, Klingelbergstrasse , CH-4056 Basel, pĉk.-40-43136-2.	CHF	90,00	98,00
Ukrainio : Dmitrij M.-Cibulevskij, a/k 9307, UA-310003 Ĥarkovo-3	€	10,00	11,00
Usono : Dan Glass, 7366 Park View Terrac, Mounds View, MN 55112., Reto: <dglass1@comcast.net>.	USD	70,00	78,00
Aliaj ne jam menciitaj landoj			
Ceteraj Eŭropaj landoj	€	33,00	36,00
Cetero de la mondo	€	20,00	22,00

Ni estis devigitaj iom plialtigi la kotizojn ĉar multaj niaj membroj eĉ ne pagas per sia kotizo la afrankon. Do, ni petas ĉiujn kiuj povas, **pagi PLENAN KOTIZON** ! Dankon !



78-A SAT-KONGRESO ZAGREB (HR) 02.- 09.07.2005



Korespondadreso:
Marija Belošević, 78a SAT-kongreso, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio.
Tel.: +385.98.57.00.46, rete: sat_hr@yahoo.com, hejmpaĝo: http://www.geocities.com/sat_hr/kongres2005.html

OKK: Marija Belošević, Gordana Plavšić, Zdenka Svetličić.

Kongreskotizoj (en €)	**ĝis 31.01.05**	**ĝis 30.04.05.**	**ĝis 30.06.04**	**pli poste**
SAT-membro	55	65	75	85
SAT-geedzoj (se ambaŭ)	80	95	110	125
SAT-junul(in)o ĝis 25 j.	25	30	35	40
Nemembro de SAT	70	80	90	100
Junula nemembro de SAT	35	40	45	50

❑ Infanoj ĝis 10-jaraj ne pagas kotizon.
❑ La partoprenantoj el CZ, EE, HU, LT, LV PL, SI, SK ĝuas 30% rabaton. La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI, eksa SU (krom EE, LT kaj LV) kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50 % rabaton.
❑ La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro ia ajn ekstera kaŭzo.
❑ Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.
❑ La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn kaj aliajn pagendajn aferojn. Ĝi ne inkluzivas ian ajn asekuron.
❑ **ATENTU** : Personoj el landoj, kiuj bezonas enirvizon por Kroatio, devas indiki tion antaŭ la 30-a de aprilo 2005. Pli poste ne plu eblos trakti tion. Ni petas ke vizpetantoj nepre aldonu necesajn datumojn.
❑ Al nealiĝintoj la OKK ne sendas invitleteron.
❑ Aliĝo al la kongreso validas nur post la pago de la kotizo kaj koncernaj prezoj.

ALIĜILO al la 78-a SAT-KONGRESO

Ĉiu aliĝanto uzu apartan aliĝilon. La aliĝilon bonvolu plenigi PRESLITERE!

Personaj nomoj :..Familia nomo :..

Adreso : ....

Naskiĝdato :................................. Telefono:...Retadreso:...

Fakso:...

Tiuj, kiuj bezonas vizon por Kroatio, bonvolu aldoni jenajn informojn: Pasportnumero:..

Loko kaj ŝtato de eldono:..Dato de eldono:...

Nomo de eldoninstanco kaj dato ĝis kiu validas pasporto:..


Mi pagas al :
☐ en Francio al la poŝtkonto de SAT: n°1234-22 K, Paris (IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSRFRPPPAR)
☐ al la konto **belo-n** ĉe UEA
☐ al la konto **satz-i** ĉe FEL
☐ en Kroatio al la perantino de SAT (nur por kroatoj)

Ĉe ĉiuj pagoj ne forgesu indiki la pagokialon : 78-a SAT-Kongreso.

Dato: ....   Subskribo :...

Ĉu vi sciis pri la kongreslando ke....?

PIONIRO DE ATOMISMO


Rudjer Bošković

Fizikisto, astronomo, matematikisto, arĥitekto, filozofo kaj diplomato, Rudjer Bošković (ruĝer boŝkoviĉ) (1711-1787), jezuita sciencisto el Dubrovnik, inventis la akromatajn okulvitrojn kaj estis pioniro de la moderna atomismo, precipe per sia teorio de "puncta", bazaj materiaj partikuloj regataj per kampoj de fortoj alterne altiraj kaj forpuŝaj. Lin Nietzsche (niĉe) lokis kune kun Copernic (kopernik) inter la "venkantajn kontraŭulojn de aspekto" kaj pri li Heisenberg, la "patro de la bombo", asertis ke "lia teorio eldiras hipotezojn kiuj estis konfirmitaj en la lastaj kvindek jaroj". Bošković estis ankaŭ direktoro de "Marista reĝa optiko" sub Louis XV. Li firmigis la kupolon de la baziliko "Sankta Petro en Romo kaj la centran sagon de Duomo en Milano. Same li kontribuis al la malkovro de Urano. Li malkovris plurajn formulojn de la sfera trigonometrio, de la originala difino de la rekto kaj de la eŭklida ebeno : "cirklo, fakte sfero, kies centro troviĝas en infinito" En Parizo, je kelkaj paŝoj de la Akademio de Sciencoj, kies membro li estis, iu memortabulo memorigas pri la tiea restado de tiu sciencisto, kiu lasis sian nomon al unu kratero de la Luno.

***

REVOLUCIA VOLBO DE LA KATEDRALO DE ŠIBENIK


Verko de la kroata arĥitekto Juraj Dalmatinac (1420-1473), enskribita en la jaro 2000 en la liston de monda komuna havaĵo de UNESCO, la katedralo de Sankta Jakvo en Šibenik, estis siatempe la sola konstruaĵo en Eŭropo kies ŝtona volbo estas konstruita sen lignaĵo kaj mortero. Noviganto, Dalmatinac imagas novan metodon de kunmetiteco, sen junto, helpe de ŝtonaj slaboj laŭmezure ĉirkaŭhakitaj kaj enmetitaj en la arkojn de plankotrabo per langetoj kaj foldoj. Post lia morto, Nikola Firentinac, fidela al lia projekto, finis la supran parton. La katedralo Sankta Jakvo apartenas al unuaj konstruaĵoj de la Unua renesanco, konstruitaj ekster Italio.


Katedralo en Šibenik

***

LA PLEJ MALNOVA

La katedralo Sankta Domnius (Sveti Dujam) el Split, ĉefurbo de la regiono Dalmatio, estas laŭ sia arĥitekturo la plej malnova katedralo en la Mondo. Efektive, ĝia navo kaj ĝia absido estas nenio alia ol iama maŭzoleo de Diokleciano, konstruita en la tria jarcento. En la jaro 650 ĝi estis transformita al katedralo de la ĉefepiskopo Johano de Raveno kiu tie instalis la relikvojn de sanktaj martiroj Domnius (Dujam) kaj Anastase (Stas). Nur ĝia kampanilo, hodiaŭ simbolo de la urbo Split, estis konstruita inter la XIII-a kaj XIV-a jarcentoj. La ironio de la historio estas ke la imperiestro Diokleciano estas konata kiel unu el la plej fiaj persekutantoj de kristanoj.


La plej malnova katedralo en la mondo

***

BLANKA ŜTONO EL BRAĈ, VRBNIK KAJ ISTRIO.

De la antikveco, milionoj da tunoj de tiu blanka ŝtono estis eltiritaj el la ŝtonminejoj de Puĉiŝĉe sur la insulo Braĉ kaj estis uzataj por konstrui domojn sur la insulo, en Kroatio (palaco de Diokleciano) kaj eksterlande (Viena parlamento, parlamento en Budapeŝto, Blanka domo en Vaŝingtono, memoriga monumento en Kanado - Vimy). Pli blonda, sed same rezista, la ŝtono de Vrnik (insuleto apud Korĉula) ankaŭ estas eksportata al Eŭropo, al Ameriko kaj ĝis la katedralo de Sankta Sofia en Istambulo. Krom tiuj ŝtonoj, la kalka ŝtono de Istrio estas same konata pro sia blankeco kaj rezisto kontraŭ salpetro. Ĝi estis tre uzata en Venecio por la konstruado de multaj konstruaĵoj, digoj kaj pontoj, inter kiuj estas la konata Ponto de sopiroj.


Blanka domo en Vaŝingtono

***

ETRUSKA SKRIBAĴO

"Liber linteus Zagrabiensis" aŭ "mortotuko de la mumio de Zagrebo", kiu devenas el III-a-II-a jarcento antaŭ Kristo, estas valorega mortotuko el lano, konservita en la Arkeologia muzeo de Zagrebo, sur kiu troviĝas la plej longa konata skribaĵo per etruska alfabeto.

